



ALIĜILO
7-a renkontiĝo
ESPERANTISTOJ DE BJELOVAR AL SIA URBO
20-a – 22-a de septembro 2019

Persona nomo	
Familia nomo	
Naskiĝdato	
Adreso	
Hejma telefono	
Poŝtelefono	
Retadreso	
Alvendato	
Forirdato	
Vegetarano	JES / NE

MENDOJ KAJ PAGOJ:

Aliĝkotizo	JES / NE	50,00 kn / 7,00 EUR
Loĝado	Hotelo Central JES / NE Privataj apartementoj JES / NE	Vidu la prezojn ĉi-sube!
Datoj de loĝado	19/20 20/21 21/22 22/23	1 – 2 – 3 – 4 tranoktoj
Interkona vespero	JES / NE	00,00 kn / 00,00 EUR
Komuna tagmanĝo*	JES / NE	90,00 kn / 12,00 EUR
Ekskurso al Ĝurđevac**	JES / NE	00,00 kn / 00,00 EUR
Komuna foto	JES / NE	15,00 kn / 2,00 EUR

1. LOĜADO: Ni kutime organizas loĝadon de niaj gastoj en diversaj privataj apartementoj, kies prezoj varias, sed kostas proksimume 20,00 EUR por unu tranokto. Ĝenerale temas pri loĝado en dultitaj ĉambroj, ĉefe ekster la urba centro. La prezo ne inkluzivas turisman imposton, nek matenmanĝon.
2. Ĉi-jare ni sukcesis interkonsenti specialan rabaton por loĝado en la Hotelo Central: unulita ĉambro kostas 260,00 HRK (35,00 EUR) dultita ĉambro 500,00 HRK (67,00 EUR), trilita ĉambro 720,00 HRK (96,00 EUR) kaj apartemento (por du personoj) 750 HRK (100,00 EUR). La proponitaj prezo inkluzivas matenmanĝon, sed ne inkluzivas turisman imposton de 9,00 HRK por ĉiu persono kaj por ĉiu nokto. **Ĉar la nombro de disponeblaj litoj en la Hotelo estas limigita, nepre rezervu vian loĝadon ĝis la 31-a de majo 2019. ATENTU: la menciitajn prezojn vi povas uzi nur mendante kaj pagante pere de Bjelovara Esperantista Societo, kiu ricevis grupan rabaton! Se vi mendos loĝadon rekte ĉe la hotelo, vi pagos pli altajn prezojn!**
3. La Hotelo Central troviĝas en la urbocentro, promendistance al lokoj kie okazos niaj programoj. En la Hotelo okazos ankaŭ nia komuna tagmanĝo la 21-an de septembro. La Hotelo posedas senpagan parkejon por siaj gastoj.
4. INTERKONA VESPERO okazos la 20-an de septembro (vendredo) je la 19h00 en la Dolĉaĵejo "Zagorje".
5. *KOMUNA TAGMANĜO la 21-an de septembro: kokina supo, panumita meleagra brusto, steko de Bilogora, legomoj frititaj en butero, bakitaj terpomoj, miksita salato. **Se vi estas vegetarano, nepre anoncu tion anticipe!** La tagmanĝo ne inkluzivas trinkaĵojn, kiujn ĉiu partoprenanto pagas aparte laŭ propra mendo.
6. **EKSKURSO AL ĎURĎEVAC la 22-an de septembro estos senpaga por ĉiuj kiuj pagis plenan aliĝotizon (50,00 kn / 7,00 EUR). Estos organizita busa transporto de Bjelovar al ĎurĎevac kaj reen kaj pikniko kun senpagaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. La ekskurso inkluzivas viziton al la urba fortikaĵo Stari grad (kun aparte pagata enirbileto!) kaj inaŭguron de nova sidejo de Dokumenta Esperanto-Centro kun starigo de memortabulo.
7. PAGADO: Kroatoj faru ĉiujn pagojn samtempe kun la aliĝo al la banka konto de Društvo Esperantista Bjelovara ĉe Erste & Steiermärkische Bank – **HR1224020061100615259**, menciante la celon de la pago: *Esperantisti Bjelovara svome gradu*. Alilandanoj sendu aliĝilojn, sed pro la altaj bankkostoj pagu post la alveno ĉe la kasisto de Bjelovara Esperantista Societo.
8. La aliĝilojn sendu al: esperanto.bjelovar@gmail.com kaj vizitu nian retejon www.esperanto-bjelovar.hr
9. ĜDPR (Ĝenerala datum-protekta reglamento): Subskribante ĉi tiun aliĝilon, ĉiu aliĝinto permesas uzadon de propraj datumoj por organizaj kaj dokumentaj celoj de la 7-a renkontiĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*, kio inkluzivas ankaŭ aperigon de sia nomo, familia nomo kaj lando sur la publika listo de partoprenantoj, aperonta en la retejo www.esperanto-bjelovar.hr kaj publikigon de fotoj kaj filmoj el la menciita aranĝo sur kiuj la aliĝinto videblas. La respondeculo de DEB pri ĜDPR kontakteblas ĉe: esperanto.bjelovar@gmail.com

Dato de aliĝo	
Subskribo	